

Rio Esperantista

A photograph of a musician wearing a hat and playing a guitar on a stage. The scene is lit with blue and purple spotlights, creating a dramatic atmosphere. The musician is seen from behind, and the stage floor is visible in the foreground.

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 193 (2015:1)

Jan – Mar 2015

Kaj Tamen Ni Sukcesis!

Fernando Pita

Nova
Klerismo
kaj Toleremo

Renato Corsetti

Evoluo de
Esperantlingva Stilo

Roberto Ribeiro

Omaço
Jorge Campos

Babilado kun...
Nazaré Laroca

La ZEOj de
Rio-de-Janeiro

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Eperantista de Rio-de-Janejro

N-o 193 (2015:1)

Jan - Mar 2015

74-a jarkolekto

Redaktas: Fernando Pita

Aranĝas: Allan Argolo

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Fernando Pita, Renato Corsetti,

Nazaré Laroca, Ismael de Miranda,

Roberto da Silva Ribeiro kaj

KarEJO.


Kovrilo:


Foto: Thiago Lara, *Tarcísio Lima dum la Arta Vespero de la 50-a BKE*, Teatro Gonzaguinha, RJ.



Associação Esperantista do Rio de Janeiro

Rua Teófilo Otoni, 135 / 302
telefone: 2467-4296

 aerjrj@hotmail.com
disvastigo.aerj@gmail.com

 www.aerj.org.br

 facebook.com/aerj.esperanto

 youtube.com/user/TVaerj

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA PRATECO

ALDO O. DOBLAS Responda Direktoro	SYLLA M. CHAVES Sekretario	Administranto DELIO PEREIRA DE SOUZA
JARABONO Estrada - Cx 30.00 BRAZILIO - Cx 15.00 An. 25 (Responsabilo) JARJO 1	RIO DE JANEIRO, ABRIL 1947	Redakcio kaj Administrco R. DAS MARIÇAS, 39, 2 ^a andar Tel. 42.5731 - C.P. 3077 Avulso - R\$ 1.00

RIO ESPERANTISTA

ORGANO DE LA ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO DE JANEIRO

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA PRATECO

DIREKTORO Délío Pereira de Souza	REDAKTOROJ En Rio A. C. de Martins Lello São Paulo László Zríner	====MAJO KAJ JUNIO==== 1.959	NI PETAS VIAN OPINION A D R E S O: Praça Pio X, 78, sl. 716 RIO DE JANEIRO BRAZILIO
-------------------------------------	--	---------------------------------	---



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro - dezembro / 2010



PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA PRATECO

Fondita en 1947 - Setembro/Oktobro 1967 - Nº 146 - 14ª Jarkolekto

RIO



ESPERANTISTA

OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO DE JANEIRO Nº 18 JANUARO - MARÇO 1997

RIO
esperantista



Nº 01
Nº 11.000
Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro
Biblioteca "CARLO SCUDER" Nº 11.000
Nº de ordem: JAN/MAR-RR

ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO-DE-JANEIRO
Dezembro - Janeiro - 2013

Enhavo

- El la Redakcio _____ 3
- Kaj Tamen Ni Sukcesis _____ 4
- Nova Klerimo kaj Toleremo _____ 7
- Babilado kun Nazaré Laroca _____ 8
- AERJ dum 2014 _____ 9
- Fikcia Intervjuo kun Jorge Campos _ 10
- La ZEOj de Rio-de-Janejro _____ 13
- Kvizo _____ 15
- Evoluo de Esperantlingva Stilo _____ 16
- Kaj naskiĝis KarEJO _____ 21

Karaj AERĴ-anoj,

Jen denove en viaj manoj nova eldono de Rio Esperantista! Ĉi-foje ni havas por vi multe da rakontindaĵoj, ne nur rilataj al nia asocio, sed ankaŭ pri la espeanta movado ĝenerale.

Dum la monato de Januaro Rio sidejis la 50-an Brazilan Kongreson de Esperanto, magia numero, ĉu ne? Do vi havos tie-ĉi etan raporton pri la kongreso kaj pri la plej gravaj okazintaĵoj en ĝi. Ankaŭ ni preparis retrospektivon de la precipaj faritaĵoj de via Asocio dum la jaro 2014, atente legu ĝin por rimarki ke via Asocio daŭre laboras por Esperanto.

En la komenco de Februaro, la tuta mondo estis surprizita pro la terura atenco en la redakcio de la franca revuo *Charlie Hebdo*. Tiu amara fakto motivigis nian italan samideanon Renato Corsetti, eksprezidento de UEA, skribi – speciale por *Rio Esperantista* – tekston en kiu li proponas manierojn por ne sin lasi infektigi je tiu nuntempa malsano, netoleremo; kaj samtempe pace kontraŭbatali la nunajn fundamentismojn kiuj atakas la hodiaŭan mondon.

Ĉi-eldone ni prezentas du intervjuojn: unu, realan, kun la minasa poetino Nazaré Laroca, kiu parolas al ni pri sia poezia vervo kaj kreemo, kaj alian, fikcian, farita de nia samideano Ismael de Miranda kun nia koramata samideano Jorge Campos, persono kiu, ĉiam malavare, sindone kaj malferm-



kore, kunlaboris kun nia Asocio. Tiu intervjuo estas eldonata nun, memore al unua datreveno de lia forpaso. Al vi, S-ro Jorge, nian plej simplan sed sinceran omaĝon!

En la antaŭa numero de Rio Esperantista, oni lanĉis kvizon pri ia loko de Rio; ĉi-numere ni alportas novan, ankaŭ pri nia *Mirinda Urbo*. Kaj same pri Rio estas artikolo pri la urbaj lokoj iel rilataj al Esperanto. Mi esperas ke vi ĝuu ĝin!

Nia samideano Roberto Ribeiro, profesoro de Ŝtata Universitato de Paraiĥo, donas al ni veran lecion pri la evoluo de la esperanta stilo. Tiu artikolo estos la unua el la prilingvaj tekstoj kiu via revuo lanĉos. Por alporti al nia legantaro variecon de vidpunktoj kaj opinioj pri tiu stranga fenomeno nomata Esperanto, ĉiu teksto estos prezentita de malsama persono, sed ankaŭ ĉiam de elstara konanto de nia lingvo.

Laste, ĉu vi scias kio estas KarEJO? Junuloj klarigos al vi. Bone, oni jam parolis multe, ĉu ne? Do, ek al legado!

Fernando Pita



Ĉeestantoj, momentoj antaŭ la solena malfermo.

Malgraŭ kelkaj plendoj pro “ripeti la lokon” en kiu estis okazinta la kongreso de 1987, okazis en Rio la 50-an Brazilan Kongreson de Esperanto; al kiu, malgraŭ la malfacilaĵoj kaj kostoj esti en Rio dumsomere, aliĝis diversaj samideanoj de ĉiuj regionoj de Brazilo, kaj ankaŭ de diversaj aliaj landoj, venintaj al Brazilo ne nur por ĝui la etoson, sed ja por kunlabori en la evento mem.

La solena malfermo estis rapida, por cedi spacon al prelego de Pedro Cavalheiro, eksprezidento de BEL, kiu vere lektiis al ni pri disvastigo de Esperanto. Interesege prelego kiun multe instruis al la ĉeestantoj pri la ŝanĝendaĵoj en niaj jam kaduk..., tio estas, tradiciaj disvastigmetodoj!

Menciindas sinjorinoj Tatjana Lostukova, el Rusio; kaj Mina Dan, el Barato. La unua preparis tre agrablan kaj fruktodonan kurson por progresantoj. Al ŝia kurso iris aro da lernantoj soifantaj iel antaŭeniri en nia lingvo. La ĉiam afabla kaj ĝentila Prof-ro D-ro Mina Dan, el Kalkuta Universitato, konferencis pri *Lingva*

Solenaĵo: Kongresa malfermo. Dekstre-maldekstren: Márcio Santos (AERJ), Evandro Avellar (BEL), Fernando Maia (BEJO), Fernando Pita (UERJ)





Tatjana Loskutova (centre) kun siaj kursanoj.

kaj kultura diverseco en nuntempa Hindio. Alia eksterlanda preleganto, sed almenaŭ voĉe konata de multe da brazilanoj, estis la aŭstro Anton Oberndorfer kiu parolis al la ĉeestantaro pri siaj spertoj uzi interreton por stariĝi radion en Esperanto.

Krom tio, rimarkinte ke Rio, urbo kun granda kvanto de esperantistoj, neniam okazigis sesion de KER-Ekzameno; oni decidis realigi ĝin – kaj kiel en antaŭaj jaroj – oni ankoraŭfoje realigis ĝin kune kun la



KER-ekzamenontoj, ankoraŭ ridetantaj, tuj antaŭ la ekzameno...

kongreso. Al tiu nur skriba sesio aliĝis 25 kandidatoj, ĉeestis 21, kaj estis finfine aprobitaj 19 (al ĉiuj ili, koran gratulon!!!).

Gravega afero por ni estis la lanĉo de libroj dum la kongreso: Túlio Flores oficiale lanĉis la brazilan eldonon de la *Fundamento de Esperanto*, verko al kiu ni ja povas aŭguri grandan sukceson, ĉar ĝi estas unu el plej gravaj de nia lingvo kaj kulturo; kaj Fernando Pita kaj Maira Nobre lanĉis sian *Kvinlingvan Vortareton*, verketon kiu, ni esperas, multe helpos la esperantistaron pli bone lerni sian kaj aliajn lingvojn.



Túlio Flores montrante al la mondo sian “bebon”.

Gvidita de BEJO, kaj celante treni trafajn aktivulojn, okazis dumkongrese nova sesio de AMO-Seminario, fine de kiu oni havis novan grupon de samideanoj preparitaj por prezenti Esperanton al nova kaj ĉiam ŝanĝiĝanta mondo pere de novaj argumentoj, ideoj kaj vidpunkton. Al tiuj, bonŝancon!

Raporto *Kaj Tamen Ni Sukcesis!*


Fine, ni havis ĝojan kaj agrablan *Artan Vesperon*, en kiu, interalie, brilis la (verdan) stelon de nia kara Tarcísio Lima, kiu oferis al ni belegan prezentadon de siaj kanzonoj.

Konklude, oni ja povas cerbumi, ke, post tiu kongreso, kelkaj aferoj ne plu estos la samaj.



Tarcísio kantas dum unu el la plej kortuŝaj momentoj de sia prezentado

Pacaj batalantoj fine de la kongreso: laĉaj sed feliĉaj



Jen lanĉita la Kvinlingva Vortareto!

Ĝi enhavas la plej ordinarajn vortojn en la lingvoj esperanta, angla, franca, hispana kaj portugala.

Organizita laŭteme kaj belege ilustrita, ĝi ja estas bonega ilo por lerni esperanton kune kun aliaj lingvoj.

Kontaktu nin kaj akiru vian ekzempleron!

Renato Corsetti¹ - Italio

Ondo de malraciaj ideoj disvastiĝas tra la mondo. Neniu lando en la mondo ŝajnas sekura kontraŭ ili. Ili estas kaj de religia naturo kaj de nereligia naturo. Multaj homoj ankoraŭ disvastigas ideojn el malnovaj tradicioj pri la ekesto de la mondo kaj de la homo, kiuj ne eltenas racian ekzamenadon fare de kvin-jara bebo. Multaj, tute aparte en ekonomie evoluantaj landoj, disvastigas ankaŭ ideojn baze de mezepokaj mitoj pri supernaturaj estaĵoj, kiuj nuntempe regas en multaj filmoj aŭ en aliaj formoj de ‘artaj’ produktaĵoj.


La apliko de tiuj malraciaj ideoj portas al krimoj kontraŭ la homaro malfacile akcepteblaj kaj de religiaj kaj de nereligiaj homoj kaj ĝenerale al pliigo de perforto en ĉiuj landoj de la mondo.

Unu el la plej malraciaj ideoj estas tiu de la ebleco de daŭra kresko de la ekonomio eĉ se la sekvo estas la malapero de la mondo mem pro ekologia katastrofo, kiu jam anonciĝas. Ni devas trovi novan ekonomian sistemon, kapablan kombini liberecon, justecon kaj fratecon.

Estas tempo kontraŭbatali la malracion per nova formo de racia klerismo. Ni ekiru de la tiamaj kleristoj de la 18-a jarcento kaj plukonstruu sur iliaj rezultoj. Ĉiu povas facile trovi en sia lingvo, kaj ankaŭ en Esperanto, verkojn de Voltaire (Volter) aŭ de aliaj kleristoj.

Kune kun klerismo iru ‘toleremo’ al aliaj kulturoj kaj pensomanieroj. Nur tiel oni povos kune antaŭeniri. Neniu insistu pri la absoluta vero de siaj pensoj, sed ĉiu kunkritiku siajn pensojn kaj tiujn de la aliaj.

¹ Corsetti estas lingvisto kaj eksprezidanto de UEA.





Dum la 50-a BKE, *Rio Esperantista* intervjuis la aktivulinon Nazaré Laroca, kiu ĵus lanĉis “Penseroj”-n, sian debutan libron de poezio en Esperanto. Profesorino de Federacia Universitato de Ĵuizdeforo (UFJF), Nazaré babilis ankaŭ pri siaj spertoj kiel esperantisto en tiu fako. Jen nia rapida babilado kun ŝi, pri poezio, instruado, ktp. Ĝuu ĝin!

RE: *Via libro “Penseroj” estas via debuta verko en Esperanto, sed ĉu vi havas aliajn verkojn en la portugala? Se jes, pri kio ili temas?*

NL: Jes. Krom *Penseroj*, mi verkis tri poemlibrojn en la portugala, nome: *Sem Cerimônia*, kies dua eldono estis lanĉita en 2000; *Poemas sem Endereço*, ankaŭ el 2000, kaj *Travessia do poema*, el 2012. Mi ankaŭ publikigis, kunaŭtorece, aliajn verkojn kiuj temas pri Lingvistiko (Aplikata kaj Teoria), ili estas *Aprendendo Português do Brasil: um curso para estrangeiros*, el 1992, *Manual de Morfologia do Português* – en 2011 estis lanĉita ĝia 5-a eldono!, kaj *Transitividade traço a traço*, en 2014.



RE: *Oni scias, ke dum multe da jaroj vi instruis en UFJF (Federacia Universitato de Ĵuizdeforo, kiel vi ekvilibris la vivon de instruisto en universitata beletra medio (ĝenerale kontraŭa al Esperanto) kun*


via esperanta vivo?

NL: Mi emeritiĝis en 1991 kaj eklernis Esperanton en 2003. Do mi ne spertis tian malkomforton. Aliflanke mi estis kuraĝa, ĉar mi alfrontis la universitaton UFF, en 2009, kiam mi sukcesis defendi doktoriĝan tezon pri Esperanto, kies titolo estas *O caráter verbo-nominal do aspecto em Esperanto (La nominalverba karaktero de la aspekto en Esperanto)*.



RE: *Multaj poemoj, kiuj formas “Penseroj”-n, temas pri aspektoj de via esperanta vivo. Kial vi preferis tion fari? Ĉu tio estis konscia decido aŭ nura koincido?*

NL: Via demando estas interesa; fakte mi neniam pensis pri tio. Dum la tuta jaro 2013 mi verkis poemeton preskaŭ ĉiusemajne; estis pluvo da poezio! Kaj la temoj venis al la kapo tute neatenditaj...



RE: Kaj pri novaj projektoj? Kiam ni havos novan produktadon de vi?

NL: Kiel vi scias, mi klopodas nutri mian dulingvan blo-

gon (www.nazarelaroca.blogspot.com.br) per poeziaĵoj aŭ prozaĵetoj. Mi ne intencas publikigi novan poemplibron ĉar ankoraŭ estas multaj ekzempleroj de *Penseroj*. Poeziaj verkoj malfacile vendiĝas en nia lando.

AERĴ dum 2014

Retrospektivo

AERĴ-estraro

Dum la jaro 2014 nia Asocio multe laboris por Esperanto, disvastigante nian aferon aŭ ekkomencante novajn projektojn kiuj multe helpas la kreskon de Esperanto, jen la precipaj el ili:

Ni starigis la Kampanjon por Esperanto en la Dujara Librofoiro de Rio de 2015.

Ni starigis la projekton *AERJ Itinerante*, en kiu oni vizitadis la plej diversajn E-grupojn en la urboj *Três Rios*, *Volta Redonda*, *Niterói* kaj *Rio*, disvastigante la projektojn de AERĴ kaj stimulantante la lernantojn de tiuj kursoj al praktiko de la lingvo.

Ni starigis partnerecon kun profesia fotisto, Thiago Lara, kiu instruas sian metion en la sidejo de AERĴ – kun rabato al asociitoj! Fine, procentaĵo pagita de la lernantoj revenas al nia Asocio.

Ni realigis Trejnadon por Instruistoj de Esperanto, en Aprilo.

Ni kunlaboris kun la *Fojro de Esperanto-libroj* de Niterojo, Aprile.

Ni partoprenis en la *Renkontiĝo de Paraíba Valo*, okazinta en Volta Redonda en Oktobro.

Ni ankaŭ partoprenis en la *Renkontiĝo de Esperantistoj de Okcidenta Regiono*, en Novembro.


Ni ankaŭ kunorganizis, en la Urba Konsilantaro de Rio, ceremonion omaĝante Zamenhofon je lia datreveno, en Decembro.

Ni renovigis nian oficialan organon *Rio Esperantista*

AERĴ ne ĉesas sian mision disvastigi Esperanton en nia ŝtato. Helpu ĝin, aliĝu al ĝi!

Ismael de Miranda e Silva

En 1987, post kiam mi emeritiĝis, mi komencis vizitadi, po unu foje semajne (lunde, de la 8-a ĝis la 10-a kaj duono) profesoron Jorge Campos de Oliveira. Tio daŭris 27 seninterrompajn jarojn, ne esceptante sanktajn nek feriajn tagojn (1-a de Januaro, Karnavalo, 7-a de Septembro, 25-a de Decembro, ktp.) Mi povas aserti, ke tiu estis tempo, kiun mi tre multe profitis pro la plezuro de la kunvivado, pro la neniam mankanta kafeto de 9-a kaj duono kaj pro la erudicia kaj ampleksa sciado kiu elradiis el tiu escepta kamarado. Li persone estis la korpigo de simpleco kaj eĉ alproksimiĝis al anĝeleco. Sen ajna orgojlo, sento de supereco aŭ stulta malmoldereco, li transdonadis pogute konojn pri ĉiuj kampoj de la homa sciado. Li estis profunda konanto pri Ĝenerala Historio, Geografio, Kampomezurarto (Oficiala Diplomo de Doktoro), Politika Scienco, Lingvoj (Internacia, Portugala, Franca, Hispana, Angla kaj iomete Latina). Tute kontraŭa al la politikaĉo, kvankam li neniam klaĉis pri iu ajn politikisto. Li havis solidajn konojn pri Matematiko, kiun li lernis de sia frato uzante la francan lingvon. Kvankam li ne parolis flue, li priparolis pri proverboj en pluraj lingvoj per enviinda intimeco. Pro tio, li restis konata en la esperantistaj rondoj kiel *Proverbmaniulo*. Kiam mi demandis lin: – Jorge, kiel vi havas tiom multe da scioj? Li, humile rememoris sian fraton, armean kolonelon, kiu, pro ekzemplo, devigis lin tre multe lerni, kiam li estis lernanto en la Militista Lernejo de Rio-de-Ĵaneiro. Jorge amegis tiun sian fraton, kiu mortis ankoraŭ juna. Nia intimeco estis frate amika, sed ni neniam okupiĝis pri lia privata vivo. Pro tio mi surpriziĝis, post lia morto, kiam la amikoj kaj esperantaj institucioj komencis demandi min pri la vivo de la profesoro. Tial, kiel lasta honoro al lia sindono al Esperanto, mi prezentas fikcian intervjuon, kiun mi elpensis, post lia forpaso, rememorigante etajn, nemultajn komentariojn faritajn dum tiuj paŭzoj por la kafeto. Jen ĝi:



S-ro Jorge Campos de Oliveira

IM: *Jorge, kie kaj kiam vi naskiĝis? Parolu al ni, iomete, pri via vivo.*

JC: Mi naskiĝis en San-Paŭlo, la 20-an de Aprilo 1921, filo de Henrique Campos de Oliveira kaj Yara Campos de Oliveira; mia edzino estas Celesti-

na Ribeiro Campos de Oliveira. En 1930, mi transloĝiĝis al Rio-de-Ĵaneiro. Mi diplomiĝis en la Militista Kolegio de RĴ en 1938, la antaŭlastan jaron, en kiu la diplomitoj ricevis la titolon de termezuristo. Aniĝinte en

1939 al la Militista Polico de la Federacia Distrikto (tiam la ĉefurbo de Brazilo estis Rio-de-Ĵaneiro) mi min dediĉis precipe al instruado kaj faris la Perfektigan Kurson de Oficiroj ne nur en mia institucio, sed ankaŭ en la Brazila Armeo. Mi emeritiĝis kiel subkolonelo.

IM: *Kial vi fariĝis esperantisto?*

JC: Ekde la infaneco mi estis allogata de internaciaj konvencioj kaj simboloj pri mezuroj, trafiko, muziko, kemio, ktp. En 1957 la ĵurnalo *O Globo* publikigis resuman esperantan lecionon kaj Radio MEC prezentis programon pri tiu lingvo. Tiuj du okazaĵoj vekis en mi la ideon latentan, kiun mi havis pri la Internacia Lingvo. La gvidanto de la radiprogramo min kondukis en la sidejon de BEL, mi estis prezentita al ties prezidanto kaj... la Esperantista Movado gajnis unu fidelan membron.

IM: *Kara Samideano, pri Esperanta vivo. Ĉu vi povas komenti?*

JC: La elementan diplomon mi ricevis post memlernado, la superan post kurso gvidata de Carlos Domingues, la tiama prezidanto de BEL, kaj la profesoran denove post memlernado.

La gvidanto de la radiprogramo min kondukis en la sidejon de BEL, mi estis prezentita al ties prezidanto kaj... la Esperantista Movado gajnis unu fidelan membron.

Jen miaj aktivecoj en BEL: direktado de la biblioteko kaj de la libroservo; kunlaboro en la preparo por la publikigo de libroj eldonitaj de la institucio; sama kunlaboro pri Brazila Esperantisto (precipe rilate al enpaĝigo); gvidado de elementa kurso per kores-

pondado; preparo kaj gvidado de supera kurso per korespondado kaj en klaso; helpado al la prezidanto pri ĝeneralaj aferoj. En la Brazila Klubo Esperanta, loka institucio funkci-

anta en la sidejo de BEL, mi estis sekretario, gvidis la sabatajn kunvenojn, prezentis programon en Radio Roquete Pinto, kaj redaktis la paĝon de la klubo en tiama *Brazila Esperantisto*. Jen kelkaj prelegoj de mi faritaj: *Proverbaro Esperanta; Anekdotoj pri Famuloj; El la Saĝo de la Antikva Grekujo; Amuzaj Epizodoj el la Brazila Historio; Traduko de Portugalaj Esprimoj; Modoj kaj Tempo de Verboj en la portugala lingvo kaj en Esperanto; Shakespeare en Esperanto.*

IM: *Ĉiuj brazilaj esperantistoj rekonas vin kiel proverbmaniulon. Kial?*

JC: Mi fariĝis proverbmaniulo sub la influo de tri libroj: **1) Curso de Esperanto em Vinte Lições**, enhavanta

proverbojn ordigitajn laŭ gramatika vidpunkto; **2)** *Esperanta-Portugala Proverbaro*, de Couto Fernandes, enhavanta proverbojn respondajn en la du lingvoj; **3)** *Proverbaro Esperanta* (eldonejo Stafeto) kun klasifiko laŭ temoj, fare de C. Register. Tre allogis min la koncizeco kaj la internacieco de la proverboj.

IM: *Jorge Campos, por ke ni konatiĝu pli intime kun vi, aldonu aliajn detalojn al via biografio.*

JC: Mi estas dumviva membro de UEA kaj BEL kaj konsilanto de Asocio Esperantista de RĴ. De multaj jaroj, ekde 1986, mi studas kaj praktikas Esperanton kun miaj amikoj. Mi povas dividi tiun tempon en kvin periodojn: **1-an**, *Alta Literaturo kaj Forigo de Duboj*, kun D-ro Floriano Pessoa, kemia inĝeniero. Mi telefone trouzis lian saĝecon dum longa tempo; **2-an**, *Teknika Terminaro*, kun S-ro Aroldo Paraguassu, dum 2 jaroj; emeritulo el Aerarmejo, li multe hel-

pis min pri aviada terminaro. Li klarigis precipe pri neologismoj. Kelkfoje li uzis pli ol unu horon, parolante pri *emergenco, deflektoro, kartro, steno* kaj aliaj; **3-a**, *Lingvoj latinidaj*, kun D-ro Alfredo Maceira Rodríguez, dum

3 jaroj. Ni lernis dum multaj semajnoj lian libron *Filologiaj*

Tre allogis min la koncizeco kaj la internacieco de la proverboj.


kaj Lingvistikaj Eseoj, precipe la ĉapitron *Farebleco de Lingvo Esperanto el lingvistika Vidpunkto*; **4-an**, *Religia Instruado*, kun la ĵurnalisto Manoel Fernandes, dum 3 jaroj. La simpleco kaj kompetenteco de tiu amiko, tuj tiel ravis miajn korojn, ke kelkfoje li paroladis la tutan tempon, klarigante pri la paraboloj de Jesuo. Kiam tio okazis, ni haltis absorbitaj; **5-an**, *Konstanteco kaj Disciplino*, kun S-ro Ismael de Miranda e Silva, dum preskaŭ 27 jaroj. Ah! Mi estas ankaŭ membro de Brazila Societo pri Geografio.

Fina komentario de la fikcia intervjuisto: Krom tio, kion mi skribis, por ke la samideanoj bone valorigu s-ron Jorge Campos; mi devas diri, ke mi ricevis la bultenon de AERĴ post lia morto kaj ke, nur tiam, mi eksciis, ke la aĉeto de la propra sidejo de AERĴ estis farita dank' al ege malavara mondonaco de Jorge Campos, okazinta antaŭ multe da jaroj. Mi rimarkigas al vi, ke mia kunvivado kun tiu honormerita animo estis ĉiusemajna kaj daŭris seninterrompajn 27 jarojn, ĝis la 18-an de Februaro 2014.

Fernando Pita

Inter la eksterajoj kiuj provas, aŭ almenaŭ atestas, la ekziston de Esperanto al la neesperantista publiko, oni kutime trovas referencojn al ZEOj (Zamenhof-Esperantaj Objektoj). Tiuj objektoj estas, preskaŭ ĉiam, bustoj starigitaj omaĝe al Zamenhof; bapto de stratoj aŭ placoj kun lia nomo, aŭ tiu de Esperanto, ktp. La ĉeesto de ZEOj en multaj urboj de la mondo levas strangajn sentojn inter esperantistoj: franc-brazila esperant-verkisto Gilbert Ledon eĉ diris, en *Sennaciece tra nia mondo* (1989)¹, ke pere de ili “homoj materialigas sian kulton al entoj, al ideologioj, sub homa formo”, kiuj faris el Zamenhof sian novan “ĉampionon de fetiĉismo”. Alia grava eksterajo – kies lokigo ene de la aro de ZEOj estas diskutinda – sed kiu ne havas malpli da graveco kiel atestilo de ekzisto de Esperanto, estas referencado al Esperanto ene de tute ne-esperantaj verkoj; kiel ekzemplo oni povas citi la libron *A Arma Escarlate*, de brazilanino Renata Ventura, kiu, rekreante la universon de *Harry Potter* en la faveloj de Rio-de-Janeiro, uzas Esperanton kiel ilo por funkciigo de magio en la tuta mondo. Oni povas pridubi ĉu tiu agado bakos novajn esperantistojn, sed ĝi ja estas bonega informilo al adoleskantoj kiuj legas ŝiajn librojn. Tiel, kune kun ZEOj, tiuj ekstermovadaj referencoj estas faktaj kaj trafaj propagandiloj. En la kazo esplorota de ni en tiu teksto, oni analizos kelkajn el la ZEOj ekzistantaj en Rio-de-Janeiro, urbo kie troviĝas la plej antikvan esperantomovadon de Brazilo. Tiu analizo estas motivita precipe ĉar, kvankam ilia nuna destino estas tro simila, la kaŭzoj de siaj respektivaj starigoj estas almenaŭ kuriozaj. Sed ni ekkomencu ne de la ZEOj mem, sed de unu el tiuj cititaj referencoj.

En la brazila filmo *Centraldo Brasil*², troveblas referencoj al Esperanto, sed de la brazila reĝisoro Walter Salles, estas referencoj kiu tute ne kongruas al realeco. Fine, tute *falsa* referencoj. Oni ĝis nun ne sukcesis demandi al la reĝisoro kial li decidis doni al la strato la nomon Esperanto, ĉu lia intenco estis propagandi nian aferon, aŭ kio ajn; sed fakto estas ke la filmo, indikita al Oskar-premio de plej bona ne-anglalingva filmo en 1998, fariĝis,



En la verko *A Arma Escarlate*, Esperanto rolas kiel opotuna ilo al sorĉistoj de ĉiuj nacioj.



DVD-kovrilo de la filmo *Central do Brasil*

teton inda je tiu troigo, ĉar estas strato Esperanto, en kvartalo *Campo Grande*, situata tre diste el tiu de *Cascadura* menciita en la filmo. Plie, la vera “Esperanto” estas senelira vojeto kreita nur por ebligi konstruon de domoj meze de grandega tereno. Posede de tiu informo, la mencio de la strato en la filmo fariĝas ankoraŭ pli kuriozveka fakto, ĉar, paradokse, la falsa strato ne ekzistas en la menciita kvartalo, kaj la vera, ja ekzistanta, estas nek menciita, nek vera strato.

Tamen, oni ne pensu ke nia bona Doktoro estis forgesita. Tute kontraŭe, nek li, nek lian familion: en tute alia kvartalo de Rio, nomita *Estácio*, omaĝe al la fondinto de la urbo, *Estácio de Sá*, estas ankaŭ tute rezideja strato *Zamenhof*, kie krom la

vole-ne-vole, propagandilo por ni. Sed tio alportas al ni novan demandon: Ĉu vere estas en Rio-de-Janeiro ajna strato Esperanto? La respondo povas esti jesa, se oni konsideras straten

nomo mem, neniu plia referenco al la Doktoro estas trovebla. Plie, en kvartalo *Recreio* estas strato omaĝanta lian edzinon *Klara Zilbernick* (!); kaj en alia loko, *Santíssimo*, ekzistas strato *Lidja Zamenhof* (kies nomo eĉ estas esperante skribita). Pri tiu lasta, oni rakontas ke la strato ricevis tiun nomon de la plej antikva familio de enloĝantoj, kiuj, estante esperantistoj, proponis ĝin al la Urba Konsilantaro.



Strat-ŝildo: Klara Zilbernick, en *Recreio*

Sed en Rio estas alia ZEO, tiu lasta tute nekonata de la kariokoj³ mem. En kvartalo *Guaratiba*, najbara al *Campo Grande*, estas loko tradicie, sed neniam laŭleĝe, konata kiel *Largo do Quarenta*⁴. Tiu loko, laŭ leĝo kiun proponis, en jaro 1991, la urba konsilantino Bambina Bucci, estis tiam renomigita kiel *Largo dos Esperantistas*⁵, kaj eble ĝi estas la nura ZEO en la mondo kiu omaĝas nek la lingvon, nek ĝian kreinton, sed ĝiajn parolantojn mem, kvankam ĝis hodiaŭ la tradicio imponas sin kaj eĉ la

ĉirkaŭloĝantoj ne konas la (vere ne plu novan) nomon de la loko, kiu fakte ne populariĝis.

Do la *Mirinda Urbo* devas esti la nura en la mondo travivanta tiun strangan situacion: krom la fikcia strato Esperanto de la filmo kaj la veraj - la samnoma kaj la stratoj *Zamenhof*, *Klara Zilbernick* kaj *Lidja Zamenhof* - Rio havas ekstran lokon omaĝanta esperantistojn, kiu tamen multe da kariokaj samideanoj mem ne konas, ĉar nenie, inter la menciitaj lokoj, estas klara referenco aŭ klarigo pri kio temas aŭ justigas iliajn nomojn. Konstateblas, tamen, ke inter tiaj ZEOj – kiuj fakte ne estas “objektoj” – estas nenia busto omaĝanta Zamenhof mem aŭ sia lingvo, tiel oni po-

vas diri ke, eble, tiaj ZEOj, se ne vere plenumas sian disvastigan funkcion, almenaŭ ili kontentigas la egoon de loka esperantistaro, ĉar, krom la strato Zamenhof, en *Estácio*; ĉiuj aliaj estas en la Okcidenta Regiono de la urbo, ĝuste tiu kie vivas la plejparto

¹ LEDON, Gilbert René (1989) *Sennacieca tra nia mondo*. Chapecó: Eldono de la Aŭtoro, 1989.

² La filmo estis internacie disvastigita sub la angla titolo *Central Station*. En Pollando oni ŝanĝis ĝian nomon al *Dworzec Nadziei*, kies signifo estus “Stacio (de?) Espero”.

³ *Karioko* estas vorto uzita de la naskitoj en Rio por nomi sin. Ĝi devenas el la tupia lingvo kaj signifas *petra domo* aŭ *blanka domo*, nomo donita far la indiĝenoj al la unuaj portugalaj domoj tie konstruitaj

⁴ Tio estas, *Larĝo de Kvardek*, kaj ĝis nun neniu scias pri kio temas tiu numeralo.

Kvizo

Kiu estas tiu karioka loko? Premio al la unua ĝusta respondo estas *Penseroj*, de Nazaré Laroca

Respondo de antaŭa n-ro: la loko prezentita en *RE192* estis la tiama *Cruzeiro da Lapa*, en tiu sama kvartalo, laŭ fotografio de 1908.


Lazaro Zamenhof skribis “Unu tualaj ŝanĝoj laŭ vidvino havis du filinojn”, Kabe neniam uzis artikolecan “unu”. Li elplumigis formojn kiel “estis reĝo”, “estis maljuna kaprino”, “malgranda knabino” ktp. La stilo de Kabe iĝis normala kaj la zamenhofa artikoleca “unu” arĥaiĝis, kvankam ĝi daŭras gramatike korekta, ankoraŭ hodiaŭ homoj uzadas duondifinajn “unu”, sed multaj ial nur ĉe tempaj vortoj: “unu tagon...”, “unu vesperon...”, “unu fojon...”. En 1933 Kalocsay (1933:28) diris pri la artikoleca unu: *Tio estas, se ne eraro, almenaŭ nekorekteco de stilo [...] En okazo de efektiva neceso oni povas uzi “iu” [...] Ekzemple: “Mi vidis iun serviston” (iun el certa nombro de servistoj).*

Tiu komenca periodo estas markita de fortaj reformemaj movadoj. Jam en 1894 okazis referendumo pri even-


“Hodiaŭ, oni ne skribas per la stilo de Zamenhof, kiel oni ne skribas portugallingve per la stilo de Machado de Assis.”

tualaj ŝanĝoj laŭ petoj de kelkaj Esperantistoj sed oni refuzis la proponitajn ŝanĝojn. En 1905 okazis oficialigo de la Fundamento de Esperanto, por malebligi gramatikajn ŝanĝojn en la lingvo. En 1907 okazis skismo de Ido. Ĉe la stilo, la ĉefa idista ideo, kiu floris inter esperantistoj estis la logikemo. Multaj homoj deziris ke Esperanto estus tute logika komunikilo (ilismo) kaj oni ne uzu idiotismojn (nelogikaj dirmanieroj). Multaj homoj deziris ke ĉiu vorto havu unu signifon. Hodiaŭa scienca lingvistiko montris ke tio ne eblas, sed tiam oni pensis ke oni povas krei neambiguan lingvaĵon.

Dum la Unua Mondmilito preskaŭ ĉesis la verkado en Esperanto. Tiam mortis ambaŭ Zamenhof kaj Louis Couturat, la ĉefa cerbo de Ido-movado. Baldaŭ post la militfino aperis la dua generacio de Esperanta stilo, ĉefe per la verkoj de Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy, la tiel no-



Fundamento de Esperanto - Brazila Eldono. Tradukaĵo de Túlío Flores. Eldonis BEL



mata “Budapeŝta skolo” kaj de Edmond Privat; kromliterature, gravis Eŭgeno Lanti.



Kalocsay kaj Privat faris studojn pri esperanta stilo. Privat publikigis la verkon *Esprimo de sentoj en Esperanto* en 1929 kaj Kalocsay publikigis en 1931 la libron *Lingvo Stilo Formo*. Lanti iniciatis la redaktadon de la Plena Vortaro, antaŭveninto

de la nuna PIV. Lanti klopodis anstataŭ-igi la Zamenhofan sufikson “-ujo” por landnomoj per la nova sufikso “-io” kaj Kalocsay defendis la uzon de inaj propraj nomoj finitaj per “-a”, ne nur kiel *Marta* kaj *Maria*, kies “-a” estas etimologia, sed ankaŭ ĉe *Afrodita*, *Elizabeta* kaj *Brigita*.

Tiuj aŭtoroj apogis la ideon, laŭ kiu literaturistoj kaj poetoj bezonas riĉan, nuancitan vortabundan esprimilon. Formiĝus kvazaŭ du ŝtupoj: la vulgara lingvo kun la vortprovizo nepre necesa al interkompreniĝo kaj trovebla en ĉiu lernolibro; la literatura stilo kun aparta poezia kromvortaro kaj speciale pliliberaj formoj (COURTINAT: 1966, 735).

Tiu periodo prezentis tro grandan influon de la franca lingvo, ne nur pro

la deveno de la ĉefaj aŭtoroj, sed ankaŭ pro la influo de lingvaj ideoj de novialistoj kaj interlingvaistoj kiel Otto Jespersen, Edgar von Wahl kaj Alexander Gode, la t.n. “eŭroklonistoj”, kiuj kritikis la, laŭ ili, troan slavecon de Esperanto, kaj kiuj pensis ke internacia lingvo devus esti plej eble eŭropcentra. Ankaŭ pro la tiama antisemitismo, multaj homoj volis kaŝi la “judajn radikojn” de Esperanto.

Dum la Dua Mondmilito la Esperantista mondo draste haltis. Post la militfino, aperis novan floradon de esperantlingva literaturo kaj gravaj ŝanĝoj en stilo. La ĉefaj aŭtoroj de tiu periodo estis William Auld en la “Skota Skolo” kaj Ferenc Szilágyi, redaktisto de la literatura revuo *Norda Prismo* en la “Budapeŝta Skolo”. Kromliterature gravas Gaston Waringhien.



Karikaturo de William Auld

En tiu periodo la *ata-ita* diskuto estis tre akra. La diskuto temas pri la ĝusta uzo de la participoj en Esperanto, precipe pri la pasivaj. La diskuto ekestis per artikolo de la germano Teo Jung en la esperantologia periodaĵo *Lingva Kritiko* de junio 1932. Al ĝi reagis en la samjara oktobra numero la franco Gaston Waringhien. Sekvis lavango de kontribuoj per artikoloj kaj pluraj monografioj; en Brazilo elstaris Geraldo Mattos. Tiel la ordinaraj esperantistoj komencis rigardi la uzon de la pasivan voĉon kaj de participoj kiel tre komplika afero. Multaj esperantistoj demandis al teoriistoj pri la afero. Waringhien ĝenerale konsilis al nekleruloj eviti la uzon de la pasiva kaj preferi la uzon de la aktiva voĉo por eviti kverelojn kaj erarojn. Sekve, de tiu periodo ĝis nun la esperanta stilo iĝis pli aktiva kaj la uzo de participoj mal-kreskis.

Ĉirkaŭ 1970 komencis periodo de la “politika korekto”. Ideoj pri egaleco de virinoj, kontraŭ-eŭropcentrismo kaj kontraŭ-rasismo eniris la esperantan komunumon.

Laŭ Bavant (2014) ĝis la 1970-aj jaroj, la sistemo marki sekson en Esperanto estis tre stabila. Sed tiam kelkaj Esperantistoj komencis adapti la jam

alilingve okazantajn diskutojn pri lingva seksismo al Esperanto, kritikante diversajn aspektojn de ĉi tiu tradicia lingvouzo kiel seksismajn. Ĉi tiaj kritikoj estis ekzemple abunde pridiskutataj inter 1979 kaj 1988 en la revuo *Sekso kaj Egaleco*. Surbaze de ĉi tiaj kritikoj estis faritaj kelkaj ŝanĝproponoj, el kiuj kelkaj proponis malpli drastajn ŝanĝojn ol aliaj. Ĝenerale eblas diri, ke la malpli drastaj ŝanĝoj sukcesis eniri en la ĝeneralan lingvouzon, dum la pli drastaj ŝanĝoj estis aŭ tute malsukcesaj aŭ sukcese-tis nur en iuj apartaj rondoj, sed ne en la ĝenerala lingvouzo. Tiel multaj ne plu konsideras deviga la markadon de la sekse ne-markitaj substantivoj de la unua supre difinita klaso per “-in” ĉe persono de konata ina sekso. Ili do foje diras “instruisto” por paroli pri ina instruisto, pri kies ineco ili konscias, kelkaj eĉ diras ke “ŝi estas mia amiko” anstataŭ “ŝi estas mia amikino”. En tiu lasta tendenco estas forta la influo de la angla lingvo.

“Ĝis la 1970-aj jaroj, la sistemo marki sekson en Esperanto estis tre stabila. Sed tiam kelkaj Esperantistoj komencis adapti la jam alilingve okazantajn diskutojn pri lingva seksismo al Esperanto.”





Nuntempe la ĉefa diskuto pri esperanta stilo estas la t.n. “bona-lingvismo”. *La Bona Lingvo* estas titolo de libro verkita de Claude Piron en 1989. Li es primas sian preferon por konscia eluzo de la originaj vortkreaĵoj, por ke Esperanto ne evoluu kiel ajna sed “bona” lingvo. La aŭtoro forte esprimas sian malplaĉon pri la enporto de novaj radikoj (neolo-gismoj). Li konstatas kaj kritikas la emon de francoj preferi pseŭde precizajn, intelektulajn vortojn al praktikaj vortoj kaj kunmetoj. Kontraste li montras la esprimopovon de baza vortprovizo kun imagema kunmetado. La verko de Piron iĝis programo de samnoma neformala grupo, iniciatita de Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti. Tiu grupo agas kiel prem-grupo per prelegoj, artikoloj kaj lingvaj rimarkoj en retgrupoj, per kritikado de PIV kaj eventuale aliaj vortaroj, de poetoj kaj de literaturistoj ĝenerale. La grupo laboras en propraj retejoj kaj konstruas la vortliston “Simplaj samsignifaj vortoj”, kiu proponas alternativojn al nefavorataj vortoj (ekzemple *abatiso* → *arbobaĵo*, *aberacio* → *devojiĝo* de la normo, *abdomeno* → *ventro*). Löwenstein estis redaktoro de la facila parto

de Kontakto de 1983 ĝis 1986; en tiu posteno, ŝi verkis liston de 1000 morfemoj uzablaj en la facilaj artikoloj. La bonalingvismo estas reago kontraŭ eŭrop-centrismo kaj ĝia celo estas restigi Esperanton facila lingvo por ne-eŭroplingvanoj.

Ĉefaj reagantoj kontraŭ bonalingvismo estas la hispanoj Jorge Camacho kaj Toño del Barrio, kiuj defendas la vortan abundecon laŭ la stilon de Waringhien. Por ili esperanto estu lingvo de altkvalita komunikado. Por komunikado rudimenta kun personoj alilingvaj sufiĉus la naciaj lingvoj, kiel la angla, misparolate. Ili rimarkas ĉefe ke la bonalingvistaj aŭtoroj estas eŭropanoj, kaj ke malmultaj azianoj plendis pri eŭropcentrecon de Esperanto.

Ambaŭ grupoj akre diskutas kaj unu akuzas la alian. Camacho eĉ ekzigis el Akademio de Esperanto pro tio kaj Markos Kramer estis elektita direktoro de sekcio pri Ĝenerala Vortaro de bonalingvanoj. Fakte, ambaŭ grupoj troigas siajn teoriojn, sed en la praktiko iliaj lingvaĵoj ne estas tiel malsamaj.

Claude Piron



Esperanto evoluas, kiel iu ajn lingvo. Ĉar ĝi estas artfarita lingvo, multaj homoj pensas ke estus facile “reformi” ĝin, sed ili trovas tiun forton, kiun Zamenhof nomis “inercio”, t.e., la ĝenerala lingva uzo de la esperantista komunumo, la literatura tradicio kaj la historio de la lingvo mem. La radikaj ŝanĝoj neniam floras, sed, kiel en ĉiuj vivantaj lingvoj, la uzo de la literaturistoj kaj la teorio de la gramatikistoj foje influas la lingvan stilon.

Literaturo:

BAVANT, Marc. *Esperanto kaj sekso*. En <<http://lingvakritiko.com/2014/10/16/esperanto-kaj-sekso/>> Vidita en 29/12/2014.

CAMACHO, Jorge. *La mava lingvo: neologismoj kaj malneologismoj en esperanto*. En <<http://jorgecice.blogspot.com.br/2001/01/lamava-lingvo-neologismoj-kaj.html>> Vidita en 08/01/15.

COURTINAT, Leon. **Historio de Esperanto**. 3-a vol. Bellerive-sur-Allier: Imprimerie Moderne, 1966.

DEL BARRIO, Toño. *La normala lingvo*. En <<http://www.liberafolio.org/2007/normalalingvo/>> Vidita en 08/01/15

KALOCSAY, Kolomano. *Artikolo*. In KÖKÉNY, L. ; BLEIER V. **Enciklopedio de Esperanto**. Budapeŝt: Literatura Mondo, 1933, p 28.

VAHA Blazio. *Fabel-komencoj*. **Internacia Pedagogia Revuo** vol. 4. Flandro: ILEI, 1999, p 18-24.

ZAMENHOF, L. L. **Lingvaj Respondoj**. En <<http://www.cce.ufes.br/goa/esperanto/TextoDiv/espo.htm#20stilo>> Vidita en 31/12/2014.

Kaj naskiĝis KarEJO...

Junularo

KarEJO

KarEJO? Kio damne estas tio? Ĉu ejo por karaj homoj? Eble jes, tamen ne necese.

La 28-a de marto okazis la unua oficiala (nu, sufiĉe oficiala) kunveno de KarEJO – la Karioka Esperantista Junulara Organizo. La celo estis predis-kuti planon por konkuri la mondon, kio inkuzivas eĉ *homan katapulton!* Tamen, ĉar la kunvenejo estis la sidejo de

KKE – Kultura Kooperativo de Esperantistoj, ni ŝajngis prizorgi bagatelojn kiaj or-



Postkunvena foto. Staras: Renan Lyra, Rose Alves, Daniel Souza, Matheus Arantes, Alexandre Raymond, Leandro Silvestre kaj Allan Argolo

ganizi junularan e-movadon en Rio kaj starigi BEJO-sekcion en la ŝtato.

Laŭplane, esperantistaj junuloj ofte renkontiĝos en Rio, laboros ĉe ekzistantaj projektoj kaj ankaŭ starigos proprajn projektojn.

Rimarkindas ke tia agado okazas 50 jaroj post la fondo de GEJ – la Gva-

nabara Esperanto-Junularo, organizo kiu kune kun la Cearaa Esperanto-Junularo konsistigis ĝermon por la fondo de la Brazila Esperantista Junulara Organizo – BEJO.

KarEJO havas konstantan apogon de BEJO, AERĴ kaj KKE. Intertempe, ŝatindas nia paĝo: www.facebook.com/karejorio. Vizitu ĝin!

Ni vizitos vin!



**Dia 28/04 (ter) às 18h no Esperanto-Grupo Claude Piron
Rua Anhembi, 197 - Irajá. Resp.: Fernando Pita**

campanha

ESPERANTO



NA BIENAL
DO LIVRO
2015 RIO



Participe e ajude a AERJ a divulgar o esperanto num dos maiores eventos culturais do Rio de Janeiro!

Info: disvastigo.aerj@gmail.com

XVII

Treinamento para Instrutores de Esperanto

“O ensino do Esperanto para grupos específicos”

12 de abril

8h30 às 17h00

Centro Educacional José de Paiva Netto

Av. Dom Hélder Câmara, 3.059 - Del Castilho, Rio de Janeiro

Organização:



Associação Esperantista do Rio de Janeiro
Rua Teófilo Otoni 135/302 — Centro, RJ
(21) 2467-4296 | disvastigo.aerj@gmail.com

Apoio:



Cooperativa Cultural dos Esperantistas



Legião da Boa Vontade

26^a Ŝtata Esperanto-Renkontiĝo de Rio-de-Janeiro

Rio-de-Janeiro | 16 - 17 majo 2015

Ni Semas
kaj Semas
Konstante

Renkontejo

C. E. José de Paiva Netto
Av. Dom Helder Câmara, 3059

Informoj kaj Aliĝoj

disvastigo.aerj@gmail.com



Organizaĉo:



Associaĉo Esperantista do Rio de Janeiro
Rua Teófilo Otoni 135/302 — Centro, RJ
(21) 2467-4296 | disvastigo.aerj@gmail.com

Apoio:

